

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MAJO-JUNIO-JULIO-AŬGUSTO

1978 3-4

KULTURAJ KAJEROJ

1978 MAJO-JUNIO-JULIO-AŬGUSTO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la Mondo A. Frangeul

La alpetoj J.-P. Beau

La Hititoj

La dervišo kaj la morto (fino) H. Selimovic
trad. R. Imbert

La bernaj Ursoj A. Dumas
trad. Ursulo

La venĝo B. Golden

Homamaso

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Post kelkaj tagoj la pordoj de Gresillon malfermiĝos al nova grupo de vizitantoj, pli malpli avidaj je kulturo aŭ « ripozaktivaĵoj ». Ni esperas, ke ĉio estos finpreta por la akcepto-tago, kvankam la diversaj riparlaboroj ankoraŭ ne estas finitaj la 15-an de junio. La lastaj antaŭmalfermo-tagoj certe estos denove zorgo-kaj labor-donaj. Ĉijare la nombro da partoprenantoj povus esti proksimume la sama dum ĉiu el la tri periodoj. La lastjara tendenco konfirmiĝas.

Konfirmiĝas ankaŭ ke la tradicia formo de la ĉiujara programo ne tute kontentigas la estraron. Estas dezirinde, ke almenaŭ parto de la someraj monatoj estu dediĉita al seminarioj aŭ renkontoj organizataj de Esperanto-asocioj francaj, ne francaj kaj internaciaj. La Esperanto-Domo povas disponigi strukturojn troveblajn en neniu alia esperanto-loko : loĝebleco por 90 personoj, tendumejo, manĝebleco, ĉambroj, salonoj, aŭdvidaj aparatoj, 17-hektara parko. Ŝajnas, ke la eksterlandaj organizatoj ne konas tiujn eblecojn kaj ne scias, ke la Esperanto-Domo Gresillon estas subteninda ankaŭ pro tio, ke ĝi estas kreitaĵo de esperantistoj estrita de kelkaj samideanaj sindonemaj tute ne salajritaj amikoj. Ŝajnas ankaŭ, ke oni ne scias tra la esperanta mondo, ke la kastelo Gresillon estas malfermita al ĉiuj esperantistoj multopaj aŭ unuopaj el kiu ajn lando, el kiu ajn kredo religia aŭ politika. En Gresillon oni ne kaŝu sian opinion sed oni respektu tiun de la aliaj. Kulturon oni akiras tiom per aŭskultado, kiom per parolado. Despli riĉodona estas aŭskultado, ke ĝi alportas la plej diversajn opiniojn la plej eĉ nekutimajn spertojn. Pro tio Gresillon estas nekomparebla loko, kie oni ne nur pasigas kelkajn tagojn sed restadas, kie oni ne nur fariĝas esperanto-lingvano sed ankaŭ esperantisto kaj mondano.

Esperanto tra la Mondo

La universala kongreso de... 1979 vigle preparĝas

La laboro de la loka kongresa komitato en Lucerno bone iradas. De nun, vi povas mendi ekzemplerojn de bela grandformata kolorafiŝo, de same bela turisma faldfolio pri Lucerno kaj ankaŭ de la unua informilo.

Adreso : Esperanto, Poŝtfako 14, CH-6512, Giubiasco, Svislando.

Kongreso ĉiam bone vizitata

Ĉirkaŭ 350 fervojistoj el 18 landoj ĉeestis la internacian kongreson de tiu fako en Romo.

Pluraj eminentuloj de la itala socio-politika vivo ĉeestis en la inaŭgura kunveno, inter kiuj la senatano Alberto del Nero, prezidanto de la interparlamenta grupo « Amikoj de Esperanto », al kiu jam aliĝis 44 parlamentanoj.

Interlingvistika seminario en G.D.R.

Fakuloj el sep landoj de Orienta Eŭropo prezentis altnivelajn referaĵojn dum seminario pri la sciencaj problemoj de Esperanto, okazinta en Ahrenshoop (Germana Demokrata Respubliko), dum aprilo.

La konkluda rezolucio substrekis la signifon de la interlingvistikaj esploroj por la solvo de la monda lingva problemo. Ĝi ankaŭ alvokas por pli granda utiligo de Esperanto en la sciencoj.

Studentaj Esperanto-grupoj

La ligo de germanaj universitataj Esperanto-grupoj, kies respondeculo estas hinda matematikisto, S-ro Yashovardhan, Rheinallee 37, D-5300 Bonn 2, F.R. Germanio, petas la aliajn universitatajn esperanto-grupojn en la mondo, sendi informojn pri organizo kaj programoj.

Estonta konferenco de la ligo okazos en Darmstadt, de la 13a ĝis la 15a de Oktobro.

Monda ekspozicio de infandesegnaĵoj en Parizo

Estis akceptita principe, okaze de vizito de la estraro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.) al U.N.E.S.K.O., la propono aranĝi dum printempo 1979 (Internacia Jaro de la Infano) mondan ekspozicion de infandesegnaĵojn (kaj ankaŭ fotoj) en la halo de U.N.E.S.K.O. de Parizo, kaj poste eventuale, en la Internacia Kultura Centro Pompidou, ktp...

La materialo devas esti sendita ĝis la 1a de Januaro 1979, al Prof. J. Fairbank, Ave. T.-Rousseau, 6, F-75016 Parizo.

Ankaŭ Ĉinio en la Pupteatra Internacia Festivalo

Inter la 5a kaj la 10a de Oktobro, okazos la nun tradicia Internacia Festivalo por la pupteatroj kiuj parolas Esperanton. Tiun jaron, ankaŭ partoprenos la Pekina Pupteatra Trupo, krom pupensembloj el Bulgario, Italio, Hungario, Pollando, Jugoslavio kaj Rumanio.

Porinfana agado en Zagreb. Alkovo por kontaktoj

Laŭ kvinjara plano, ankaŭ tiun jaron, en 10 elementaj lernejoj en Zagreb oni lernas en kromhoroj Esperanton.

La infanoj de la kursoj estas la plej fervoraj spektantoj de « PIF », la Pupteatra Internacia Festivalo, kaj kelkaj el ili partoprenos esperanto-aranĝojn eksterlande.

La respondeculoj de tiu porinfana agado dezirus krei kontaktojn inter junaj geesperantistoj, partoprenigi la infanojn en renkontoj, ankaŭ gastigi eksterlandajn grupojn dum la ĉiujaraj puteatraj festivaloj (grupoj kiuj prezentus etan distran programon).

Informas S. Ŝtimec, Internacia Kultura Servo, Pf 499, Amruŝeva 5, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

Por helpi agadon en Vjetnamio

Helpo per sendo de instrumaterialo estus danke ricevita de S-ro Ngô Chân Ly 539/TK2/20, Trân Hung Dao, T.P. Hô Chi Minh, Vjetnamio.

Li aranĝas esperanto-kursojn, ankaŭ perkorespondan kurson.

Estontaj renkontoj kaj kongresoj

Jam notu ke okazos en 1979, krom la universala kongreso en Lucerno :

— la Internacia Vintra Esperanto-semajno, proponita de la fervojistoj, en Maria Alm, Aŭstrio, 17 — 24a de Marto. Adreso : A.F.E.F., A-1103 Wien, Poŝtfach 117, Aŭstrio.

— Eŭropa kongreso (Asocioj de Francio, Belgio, F.R. Germanio, Luksemburgo) en Saarbrücken, 2 — 4a de Junio.

— Internacia konferenco de instruistoj en Locarno.

— Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo, en Leipzig (G.D.R.), 9 — 11a de Marto. Informas : J. Hamann, Pŭchauerstr. 3, D.D.R.-705, Leipzig.

Inter la libroj

— « Primico », tradukoj el la poezia produktado de la fama hinda verkisto Robindronath Tagor. Traduko de P. Daŝgupto.

— « Atlas photographique astronomique » de A. Heck kaj J. Manfroid, en angla, franca, germana, hispana kaj esperanta lingvoj, kun fotoj de la grandaj observatorioj. Eldonis Desoer S.A., Liège, Belgujo.

— « La kaŝita vivo de Zamenhof » de N.Z. Maimon.

— « Internacia lingvistika simpozio, Kumrovec 1975 » (diversaj aŭtoroj).

En bibliotekoj

Rezulte de kampanjo, la libro-fako de Novzelanda Esperanto-Asocio vendis esperantajn librojn al la publikaj bibliotekoj de 8 urboj.

Modela ekzemplo de kultura agado

Fine de la lasta jaro, okazis poetaj vesperoj en Esperanto, dediĉitaj al la poeto hungara Ady, en diversaj polaj urboj kaj en Berlino (D.D.R.).

Estis la rezultato de kunlaborado inter la hungara instituto por kulturaj rilatoj kaj la esperantistaj asocioj koncernataj, kun partopreno de esperantistaj prelegisto, aktoro, kantistino kiu kantis popularajn kantojn hungarajn kaj pianisto.

Jen ekzemplo de kultura nivelo al kiu ni devas strebi por aspekti kiel « serioza » movado...

Por la radioamatoroj

— Fondiĝis klubo por esperantistaj radioamatoroj ĉe la adreso : DX Club, Alte Schlossstr. 25, D-5450 Neuwied 21 (F.R. Germanio).

— S-ro L. Robel (A. Gooller Sidlung 24, D-8640 Kronach F. R. Germanio) preparis respondilon por kompletigi liston kaj eldonis ankaŭ konfirmkarton (QSL-karton).

En Irano

La interesiĝo pri Esperanto en Irano estas ĉiam tre granda. Preskaŭ 1000 partoprenantoj enskribiĝis por la kursoj kiuj komencis je diversaj momentoj de 1978, en la Universitato de Teheran.

LA ALPETOJ

« Tiu blueta montoĉeno, kie paŝtas sin la Ora Kaprino ».

Marie Mauron.

Esploranta fingro, promenadante sur fizika mapo de Provenco, eble ekhaltos apud — ne blueta, — sed bistra nebula makuleto, flosanta inter Rodano kaj Duranco : la Alpetoj.

Bluetaj ; bistraj ; ja multalikoloraj estas niaj Alpetoj. Printempe frue, la dornaj genistoj mantelas ilin per oro. Verde malhelaj pro la ilekskverkoj kaj cipresoj, ili tamen aperas malvaj kaj rozaj dum la mildaj horoj de l'mateno kaj vespero ; nebule grizaj kiam la arda somera suno mortigas la kolorojn, ili jen ekstaras krude, greke, blankaj, kiam la mistralo taŭzas la olivarbejojn...

Ne temos ĉi-tie pri detalado de la turismaj famaĵoj : ĉiuj, almenaŭ perrenome, konas tiun montoĉeneton, tridek kilometrojn longan, kiu etendiĝas de Orgon kaj Duranco oriente ĝis Tarascon kaj Rodano okcidente, inter la ŝtonejoj aridaj de Crau sude, kaj norde la riĉaj kultivataj ebenoj de la provinco Comtat.

Kio do ? Iri pli profunden. Glanum, le Baux, ja trezoroj, sed konataj. La Alpetoj estas trezoro pli diversmaniere valora, ol supraĵe. Kaj trezoro minacata.

Ilia valoro kiel naturscienca medio postulus apartan studon, ĉar ili estas aparte riĉa kaj protektenda natura monumento ; kaj tio pro diversaj cirkonstancoj, i.a. geografiaj (la situo) kaj geologiaj. Unu ekzemplo sufiĉos : la Alpetoj estas enloĝataj de 250 specioj de birdoj, inter kiuj kelkaj tre maloftaj, daŭre observataj de ornitologoj de la tuta Eŭropo.

Ĉe la valoro de la Alpetoj kiel homa medio, ni haltos multe pli longe.

De kiam ekzistis homoj, la Alpetoj estis enloĝataj, seninterrompe, de la pratempoj ĝis nia epoko. Ili do prezentas altprezan monumenton de la homa historio.

Ni diris, ke la trezoro estas minacata. Minacata de la homo mem, kompreneble. Unue, la historio de la Alpetoj, kiel cetere tiu de la tuta Mediteranea baseno, estas tiu de malrapida sed senĉesa kaj akceliĝanta difektado de la arbara kaj vegetaĝa kovraĵo. Due, kaj pli freŝdate, minacata de la malvarmaj monstroj de la teknika industria socio — ni evitu la vorton « civilizacio » ? — kaj de grupoj kaj individuoj, kiuj ne hezitas, oferi la vivkvaliton de la posteuloj al tuja profito, kaj stulte malŝparas la fragilan homan heredaĵon.

Ni do intencas ĉi-tie :

Unue, sed rapide, desupri la vojon de Historio, de la pratempo ĝi la lasta jarcento ;

Due, iom halti, fine de la lasta jarcento, je la momento kiam la paŝtista kaj kampara civilizacio ankoraŭ floradis ekvilibre, — baldaŭ baskulonta en la kirlon de la teknika eraro ;

Trie kaj fine, precizigi la nunajn danĝerojn, klare vidi la malamikojn, priskribi la batalon, — ĉar ĝi ja estas batalo — difini, kio estas savebla, savinda, savenda,...

Kaj konkludi, tamen, en espero...

o0o

En tiu privilegia grundo, la vestiĝoj de la sinsekvaj epokoj kuŝas stakigitaj kvazaŭ teleroj ! Ĉiu sezone, la pioĉilo de kamparano altiras al la taga lumo ĉu grekan potaĵon, aŭ romianan moneron, aŭ eĉ araban kuriozaĵon.

Kian procesion de la homoj vidis tiu pejzaĝo !

Jam tri jarmiloj antaŭ Kristo, paŝtistoj tien migris el la grandaj Alpoj, kaj ĉie restas postsignoj de iliaj grotaj ŝirmejoj, kaj laborejoj liberaeraj. Steleoj krudaj, sanktejoj subteraj tajlitaj en la kalka grejso, atestas, ke niaj foraj prapatroj jam meditis pri la vivo, la morto, la animo, la sekso, la sango, la fekundo.

Dum la unua jarmilo antaŭ Kristo, la enloĝantoj iĝis kultivantoj. Ili nomiĝis Liguroj, Keltoj, poste Salianoj. Sur la altejoj protektataj de krutaj klifoj, ili konstruis remparojn, kaj fondis la unuajn civitojn. Ili adoris la montosuprojn sekurajn, sed ĉefe la teron sakralan, el kie ŝprucas la fontoj, kaj kreskas la arboj, al kie la homo mistere returniras.

Tiujn homojn, laŭ la fabelo, renkontis la heroo Heraklo, revene de la ĝardeno de la Hesperidinoj. Li laŭiris la Alpetojn, kiam la montanoj atakis lin. Lin pereontan Zeuso kompatis, pluvigante la rondajn ŝtonojn de la Crau.

Ni eniras la Historion kun la Grekoj de Masaljo kaj Arlezo, kaj poste la Romianoj. Okazis murdaj bataloj, sed ankaŭ negoco kaj interŝanĝoj. Tiam la Alpetoj vidis la senfinan sennombran vojantaron de la Cimbroj kaj Teŭtonoj, kaj aŭdis la tretadon obtuzan de la marŝantaj legioj de Romo. Ili estis la mutaj spektantoj de la gigantaj verkoj de la Romianoj, — ne nur la monumentoj, sed ankaŭ la pavimitaj vojoj, kaj la longaj akveduktoj, kiuj kolektis la akvojn de la tuta montaro. La akvoj de la norda flanko de la Alpetoj, la pli puraj kaj freŝaj, iris kvietigi la soifon de Arlezo, kaj, eĉ, sifone, trans la Rodano, la soifon de « Tinquetaille ». La sudaj, en Barbegal apud Fontvieille, funkciigis la plej imponan muelejon kaj farunejon de la Okcidenta mondo.

Kristanismo frue aperis inter la Gallo-Romianoj. Kortuŝa eltrovaĵo en Glanum estis malgranda ero da murstuko, ruĝe ŝmirita : en ĝin, per pinta ilo, iu mano anonima gravuris la fiŝon, la sekretan signon de la kristanoj persekutataj.

La nova religio, konkerinte la landon, ne detruis la antaŭajn kredojn, sed pli ĝuste adaptiĝis, kvazaŭ kapvestis ilin, ne sen skuoj. Amuze estas aŭdi la faman episkopon de Arlezo, Sankta Sezer (Césaire), en la Sesa jarcento, tondrantan kontraŭ la paganaj ritoj vigle vivantaj : « Malpermesite, alporti lampojn ĉe la fontojn kaj rite trinkadi... Malpermesite, sin lavi en la rivero dum la nokto de Sankta-Johano... ». La fajroj de la solstico fariĝis la fajroj de Sankta Johano. Sed ĝis la lasta jarcento la pilgrimado al Sankta-Sekstio, apud Eygalières, « lou Roumavage », restis pli pagana ol kristana. La paŝtistoj kaj kamparanoj kunvenis apud la fonto ne tiom por honori la sanktulon ol por omaĝi al la akvo sakrala. Jean Giono prave skribis : « En Provenco, la dioj ankoraŭ hante vagas apud la kapeloj ».

La grandaj Invadoj ne ŝparis la Alpetojn. Eĉ la Saracenoj, dum la potenca puŝo tra Hispanio kaj Francio, trapasis ilin. Sed ili postlasis preskaŭ nenion, malgraŭ la onidiroj folkloraj pri ekzemple la danco de l'olivo, aŭ la vizaĝkoloro de la Arlezaninoj ! Fakte, ili postlasis nur legendojn, sed inter ili la plej belan, tiun de la Ora Kaprino. Iu Saracena ĉefo, Abd-Al-Rhaman, venkita apud les Baux, deziris kaŝi sian militrabaĵon, trezoron fabelan. Servistoj gvidis lin dumnokte ĝis groto, kaj, tie, en profundo nekonata, li amasigis oron kaj juvelojn, kaj foriris. Sed li neniam revenis. La trezoron gardas la Ora Kaprino. Dum la nokto de Sankta Johano, ŝi lekas la salpetron desur la muroj, kaj per kolera hufo forigas la praajn seksajn sigojn desur la rokoj. Dum la jarcentoj, sennombraj serĉantoj gvatis ŝin, sed vane. Se vi renkontos ŝin, ne fuĝu ! Ŝi kondukos vin al la trezoro.

Ni malsupreniras la jarcentojn.

Jen la majestaj ŝtonoj de Montmajour. En la alta Mezepoko, al Montmajour de Arlezo iri eblis nur per boata aŭ floso. La abatejo staris sur insulo, kaj rigardis ronde al nesalubraj ebenoj kaj mortaj akvoj. La monaĥoj pioniris tenace. Centope trafitaj de la febroj de la malario, ili tamen tutdrenis la marĉojn. Al ilia jarcenta penado ni ja ŝuldas la kultiveblon de vastaj malaltejoj.

Mezepoko : la konfuzaj militoj de l'feŭdalismo furiozas ĉie. Ĉie sovaĝaj bandoj trakuras la kamparon, amasbuĉante kaj predante. La nigra morto — la pesto — balaas la landon, kaj murdas pluajn milojn da homoj. Sed ĉi-tie en la Alpetoj, kiel en kelkaj aliaj lokoj de Okcitanio, ankaŭ blovas pli milda venteto. Sur tiu sanga grundo kreskas ĝentila floro : la « Amo Galanta », la « Cour d'Amour », Kortumo de Amo. Ni komprenu, ne kortego, sed kortumo, tio estas Tribunalo. Postaj aŭtoroj brode fantaziis pri tiuj amindaj tribunaloj, preziditaj de Damoj. Sed ili ja certe ekzistis. Ni imagu ilin kiel ĉarmajn poeziajn rondojn. Opone al la krudaj moroj de la Nordanoj, kiu deziris konkeri virinon devis ne uzi perforton aŭ rajton, sed nure plaĉadi : la virino estante la juĝantino.

Tiajn kortezajn fantomojn elvokas la ruinoj de Romanin, ankoraŭ starantaj sur roko de la norda flanko de la Alpetoj. Kaj kiaj nomoj ! En la arbaro, rabistoj atakas Johanon de Chateauneuf, kaj tuj murdos lin, kiam lia trobadoro sorĉas ilin per kanzono. Bertrand de Lamanon rajdas al la kastelo, atendata de Stéphanette de Gantelme, aŭ eble, de Isoarde de Roquemartine...

Tiuj galantuloj, ĉion forgesinte pri la Romianaj masonistoj, senkomprene vidis la ruinojn de la longa akvedukto, kiu kondukis la akvojn al Arlezo, kaj certis, ke ĝi povas esti nur la belverkon de la poeto Petrarko, kiu deziras konkeri la amon de sia kara Laŭra...

Tiel floris en la Alpetoj, dum malhela epoko, la Provencaj trobadoroj.

Kun la bona Reĝo Renato (kaj la Franca Reĝo Ludoviko XI-a), ni nun forlasos la historion de la Alpetoj : ĉar de tiam, iom post iom, Provenco sekvos la vojon de la ĝenerala historio de Francio.

o0o

Sed intertempe, sur tiu antikva grundo, enradikiĝis kaj maturiĝis popolo aparta ; — raso sendependama, obstina, cetere gajhumora ; ĝi fiksis sian vivmanieron, modlis sian pejzaĝon kvazaŭ vizaĝon, kreadis vere specion de civilizo firma, aŭtentika ; naskis la ilon de ĉiu originala gento : lingvon ; lingvon riĉespriman, muzikan, terodoran. La Provencaj kamparanoj ekvilibre, harmonie, vivadis kun sia medio natura.

Marie Mauron, dum sia junaĝo, je la komenco de tiu-ĉi jarcento, ankoraŭ konis tiun vivon sur la gepatra bieno en la Alpetoj. « En tiu tempo kampara », ŝi skribas, « la vivo estis la vivo. Nur en miaj memoroj mi povas ĝin retrovi. Ni ne sciis, — sed ni vivis en akordo tre natura kun nia tero kaj nia ĉielo... Unu post la alia, laŭvice, la sezonoj koloris nian vivon ».

« Quouro la vivo èro la vivo », kiam la vivo estis la vivo : tiel Marie Mauron titolas sian libron.

Sur la kovrilo de la Almanako Provenca — « L'Armana Prouvençau » — en kiu Maria lernis legi, ŝi knabino rigardis bildon pensigan ; la Rozo de l'Ventoj. Ĉu ne la Rozo de l'Tempo ? Rozo, Rado. Sur la korto, la mulo turnigis la norion por pumpi la akvon. Rozo, Rado. La monatoj rondiras, forpasas, revenas. Antikva simbolo de l'vivo.

En tiu tempo, la vojo de nia homa destino ankoraŭ hezitis antaŭ la baskulo en la malstromon de la teknika « progreso ». Sur la bieno, la monatoj vice alkondukis sian akompanon de laboroj, semoj, kaj rikoltoj, de gestoj, kaj gastoj, kaj festoj. Jes ja, de festoj nun perditaj aŭ perdiĝantaj en la moderna grizo. Sur tiu kvazaŭ rita ŝtuparo de la kalendaro, ni haltu sur kelkaj ŝtupoj.

La unua ŝtupo, alibilde la unua petalo de l'Rozo, estis ne la frosto de la Novjaro, sed Kandelfesto, kiam ekprintempas la tero, almenaŭ en Provenco. Ĉar, komence de Februaro, ĉiam, ie, ie sur la deklivoj, ekfloras la unua migdalarbo. Sed kie ? Ne ĉiam la sama. Do la infanoj, Maria kaj ŝia frateto, kun pano kaj fromaĝo en la saketo, foriris al tiu rendevuo, por eltrovi ĝin, en ĝia neĝa gloro...

Returne, helpataj de la avino, ĵaluza gardantino de la ritoj, ili deprenis la tritikon de Sankta-Barba de ĝia telero, kaj iris planti ĝin sur la kvar anguloj de la ĝardeno, por bonfortuni la venontajn rikoltojn. Fine, vespere, ne sen melankolio, ili malfaris la kripon de Kristnasko, kaj la etaj santunoj iris dormadi jaron en sia silka papero. Kiel la radikoj de la tritiko en la ĝardengrundon, same la memoroj, kvazaŭ radikoj obstinaj, enprofundiĝis en la junajn korojn, ligante ilin vivece al ilia hejma tero.

Pluraj hirundoj heroldis la printempon. Ne birdoj, sed la kutimaj gastoj de Februaro, sezonaj vizitantoj ĉe la bieno.

Unuavice alvenis la stanisto, « lou foudèire de cuié ». En tiu tempo, la kaserolo estis stanitaj, kaj la belaj kuleroj el stano. Mola metalo, kiu rapide difektiĝas. Krome, oni zorge flankenmetis la ĉokoladpaperon, ankaŭ el stano. La stanisto do ĉion fandis en sia marmito ; li verŝis la likvan metalon en muldilojn, kaj jen elaperis belaj kuleroj novaj. Vespere, kun la gasto, oni ilin ekuzis feste, por manĝi « l'aigo boulido » — la salviosupon kun ajlo, kiu, ĉiuj scias, savas la sanon. Sekvis kantoj kaj rakontado.

Post « l'amoulaire », la akrigisto, bone konata figuro de la kripo, kiu reakrigis ĉiujare ĉiujn tranĉantajn ilojn de la domo, venis gaja trupo, la italaj seĝistoj. Per pajlo, kaj la sekaj branĉoj de la morusarboj kreskantaj antaŭ ĉiu Provenca domo, ili riparis aŭ faris seĝojn. Ankaŭ eventuale lulilojn. Post la laboro, ili ogris ĉetable ! Ili manĝegis senvorte, ĉar, laŭ la proverbo

« Touto fedo che belo perd lou moussèu »

« Ĉiu ŝafino kiu blekas perdas unu buŝplenon ».

(Daŭrigota)
J.-P. Beau,

LA HITITOJ

La Hititoj estas unu el kvin aŭ ses popoloj, kiuj instaliĝis en Malgranda Azio kaj ĝin regis dum kvar jarcentoj (de 1.600 ĝis 1.200 ant. K.). La Biblio elvokas tiun potencan popolon, kies reĝoj estis konsiderataj kiel valoregalaj al la Faraonoj : « al Abraham, kiu petas de la filoj de Heth tombon por sia edzino Sara, Efron la Hitito respondas... » (genezo, V. 10). « La Sirianoj maltrankviliĝas pro la granda armeo de ĉaroj kaj ĉevaloj, kiun komandas la reĝo de la Hititoj kaj la reĝo de la Egiptoj » (2-a Libro de la Reĝoj V6).

Nur en la 19-a jarcento, la arkeologoj malkovris ŝtonojn kaj skulptaĵojn, kiuj permesis priskribi la Historion de tiu popolo. En 1822, J.-L. Burckhart, sviso, trovas en Hama (sur Oronte) unuan ŝtonon portantan kuriozajn signojn. En 1872, W. Wright, skota misiisto, faras muldaĵon de tiu ŝtono, kies signoj similas tiujn trovitajn en 1849 sur la Ninevo-sigeloj. Neniu scias ilin interpreti. En 1876, la malkovro de Karkemish, Hitita urbo, en la norda Sirio aperigas multajn skulptaĵojn : estas irantaroj de eminentuloj, reĝoj kaj dioj, ĉirkaŭataj de surskriboj similaj al tiuj trovitaj jam en Ankara-regiono. Demando stariĝas : kiu popolo estis sufiĉe potenca por inventi skribon, por regi Sirion, por rilati kun la potenca Ninevo ? En 1907, Hugo Winckler malkovras, apud Ankara, kolosan templon kaj palacon, kun interne, pli ol 10.000 fragmentoj de Hititaj tabeloj ; interalie troviĝas letero adresita de la reĝo Hattousil al Ramses pri bipartita traktaĵo (cetere, hieroglifa surskribo sur la templo de Karnak montras la saman traktaĵon).


Estas Bedrich Hrozny, juna Ĉeka lingvisto, kiu, en 1917, malkovras la ŝlosilon de tiu kojnoforma skribo. Unua dedukto : ĝi ne estas ŝemida lingvo, sed hindo-eŭropa lingvo ; do, antaŭ du jarmiloj, tiuj malproksimaj Hititoj estis — por ni, okcidentuloj — niaj kuzoj.

Antaŭ la alveno de la Hititoj, la baseno de Halys, centro de Malgranda Azio, estis loĝata de la Hattis-oj. Tiu anatolia duoninsulo interkomunikis kun Egiptujo tra la Siria marbordo, kaj ankaŭ kun Mezopotamio, el kie, tra la iranaj altebenaĵoj, oni atingis Centran Azion kaj Hindujon ; pere de la insuloj, ĝi estis najbaro de la kontinenta Grekujo.

En Alaça Höyük (regiono de Bogaz Koy) oni malkovris tombojn (el la 3-a jarmilo) de granda riĉeco kaj delikata arto, en kiuj abundis oro kaj arĝento. En Kültepe (Kanis) ne malproksime de Kayseri (la antikva Cezareo) oni trovis du apudmetitajn urbojn, kiuj ekzistis ĉirkaŭ 1.900-1.800, do antaŭ la alveno de la Hititoj ; estis anatolia urbo kaj komercista asiria urbo.

La Hititoj, de Kaŭkaza raso, alvenis tra Tracujo kaj Helesponto, sur la anatoliajn altebenajojn ĉirkaŭ la 3-a jarmilo. Sed estas nur en 1.800, ke ili okupis la ĉefurbon Hattousa. La invadantoj trudis sian lingvon al la praloĝantoj sed adoptis ilian nomon : Hattis-Hittitoj.

Ĉirkaŭ 1.600 la reĝo Labarna kaj lia filo Hattousil la unuaj unuigadas la Centran Anatolion



ĝis Eŭfrato. Sed la reĝeco restas feŭda ; la Imperio estas ensemblo de princlandoj, vasalaj kaj alianciĝintaj, kiuj pagas tributon al la reĝo ; la nobeloj, riĉaj de teroj, spitas la reĝon kaj okazigas ribelojn. En la komenco de 1.400, Suppiluliuma profitas la egiptujan krizon (sub Amenophis IV) por aneski Sirion. 1.350 markas la apogeon de la Hitita Imperio. Sed la internaj ribeloj, la atakoj de Egiptujo, la naskiĝanta forto de la Asirianoj, ĝin minacas kaj fine de 1.300 la « Popoloj de la Maro », hindo-eŭropaj triboj, invadas la Malgrandan Azion. La Hitita Imperio falegas kaj partiĝas en malgrandajn reĝlandojn, kiuj instaliĝas en Suda Anatolio kaj, de tiam, vivas de agrokulturo kaj bredado.

La Hitita Ŝtato estas precipe militista kaj estrita de militista aristokrataro deveninta el la arjanaj konkerantoj. Ili estis grandaj konstruantoj ; enorma remparzono kaj timegindaj citadeloj defendis la ĉefurbon Hattousa. Tiuj ciklopaj muroj (inter kiuj unu Pordo de Leonoj), sendube inspiris tiujn de Trojo kaj Miceno. La Hititoj praktikis la ĉar-batalojn ; tiu nova batalmaniero inspiris la ĉar-konkursojn de la Micenanoj. Tiu feŭda reĝeco estis regita per juristaj reguloj kaj per morala kodo tre strikta, kiu insistis sur la prirespondeco de la individuo ; tiu nocio estis tute nova en la antikva mondo ; la du Hititaj leĝo-libroj, kiujn oni konas, inspiriĝis de la mezopotamiaj kodoj.

La Hititoj estis rimarkindaj metalurgiistoj ; ili ekspluatis kaj prilaboris kupron, plumbon, oron kaj arĝenton, kiuj certigis ilian riĉecon ; Ili primajstris ceramikon. Iliaj skulptaĵoj estas plen-reliefaj kaj prezentas precipe siluetojn, pro la tre dura bazalto ; estas friso de 80 personoj sur la rokoj de Yazilikape, apud Bogaz Koy.

Iliaj antaŭuloj, la Hattis-oj, favore al gravaj rilatoj kun Mezopotamio estis enkondukantaj la unuajn kulturajn elementojn. La Hitita reĝo Suppiluliuma (1385-1350) edziĝis kun Babilonia princino ; kun ŝi alvenis medicinistoj, pastroj, arkitektoj kaj novaj scioj pri medicino, magio, religio, kaj literaturo. La argilaj tabeloj de la Hititoj konsiderigas ilin kiel kreantojn de la Historio ; ili rilatis kun la Akajanoj kaj transdonis siajn sciojn al la Kretanoj, al la Trojanoj kaj al la Micenanoj.

Religio

Antaŭ ol esprimi siajn orakolojn, la Hattis-oj ekzamenis la kondutadon de la fiŝoj kaj de la serpentoj lokitaj en basenoj, kaj la flugadon de la birdoj. Estas tute primitiva religia kredo. La Babilonianoj konigis al la Hititoj astrologion kaj hepatologion (tiu studo de la hepato ĉe buĉoferitaj bestoj retroviĝos ĉe la Etruskoj kaj ĉe la unuaj Romianoj).

Astronomio estas de Mezopotamia origino ; la horoskopaj tekstoj de la Hititoj estas nur kopioj de la mezopotamiaj skribaĵoj ; tiuj kopioj, faritaj sub Suppiluliuma ŝanĝis nur la nomojn de la dioj kaj de la reĝoj ; la nomo de la monatoj estis sumeraj ideografiaĵoj. La Hitita Imperio alportis nenian novan ideon en Anatolio.

Por la Hititoj, kaj laŭlonge de ilia tuta historio, la Potenco de la Universo estis koncentrita en la manoj de kelkaj diaj potenculoj, kape de kiuj troviĝis Hipa, la Granda Patrino, ĉefa diaĵo en preskaŭ la tuta Malgranda Azio ; ŝi personigas la Reproduktantan Forton de la Naturo. Apud ŝi Tesup, dio de la Suno, dio de la Fulmotondro, dio de la Tempestoj ; ĉe la Hititoj ekzistis 21 dioj de la Fulmotondro, sed Tesup regas super ĉiuj. Starante sur taŭro, ĉar li posedas grandegan brutaron, li tenas en siaj manoj la tridenton de la Fulmo kaj la reĝan sceptron. Dio de la milito, li helpas la reĝon en la bataloj. Li estas la Justicisto kaj la reĝo petas lian helpon : « kiu malbone agis kontraŭ mi, ci, Suno, ekvidu lin » ! (la greka Zeŭso multe similos la Hititan Tesup).

Apud tiuj du ĉefaj dioj, aliaj diaĵoj regas ĉion en la homa vivo ; la dio Cervo, rajdante sur cervido, kun arko ĉe mano, protektas la multĉasaĵan arbaron ; Telepinu, dio de la vegetalaro periode malaperas ĝis abelo vokos lin el lia sekreta kaŝejo (en Grekujo ankaŭ Kore malaperas dum la vintraj monatoj).

La reĝo estas la peranto inter la Dioj kaj la homoj ; li estas samtempe la Granda Pastro, la Superega Juĝisto kaj la Militestro. Multaj pastroj helpas la reĝon en la praktikado de la ritoj necesaj al la savo de la reĝlando.

Hititaj mitoj

Du mitoj enscenigas la ĉefajn hititajn diaĵojn : Historio de la Serpento Illuyanka kaj La ĝesto de Ullikummi.

La monstra Serpento Illuyanka atakas Tesup-on kaj elprenas lian koron kaj liajn okulojn por igi lin sen potenco. Por sin venĝi Tesup naskas filon, kiu edziĝas kun la filino de la Serpento. La junulo sukcesas repreni la koron kaj la okulojn de sia patro. Denove Tesup refariĝas plenpotenca kaj povas triumfi super sia malamiko.

La ĝesto de Ullikummi

Tesup perforte anstataŭas sian patron Kamarbi. Por sin venĝi Kumarbi fekundas vulkanan rokon el kiu naskiĝas Ullikummi. Kumarbi ordonas al li, ke li forĉasu la diojn el la ĉielo. Ullikummi ĉiutage grandiĝas je unu ulno. Kiam Tesup tion konscias la grandega ŝtonkolono jam atingas la templojn de la ĉielo. Vane Iŝtar, la diino, per sia muziko, provas ĉarmi la ŝtonan monstron. Tesup ne plu povas lin venki. Estas EA, la pli maljuna dio, kaj dio de la Saĝeco, kiu intervenas. Per la tranĉilo, kiu, en la komenco, apartigis la Ĉielon de la Tero, li tranĉas la piedojn de Ullikummi kaj lin faligas en la maron.

Tra tiuj legendoj aperas la genealogio de la mitaj reĝoj kaj dioj ; ili provas ekspliki la genezon de la mondo, kiun la Grekoj, preskaŭ sammaniere, esprimos kelkajn jarcentojn pli poste.

Meŝa SELIMOVIC

LA DERVIŜO KAJ LA MORTO (fino)

Se Dio punus pro ĉiu farita malbono, ne restus sur la Tero eĉ unu sola viva estaĵo (1)

Ĉio komencis plektiĝi antaŭ du monatoj kaj tri tagoj, kalkulante la tempon, ŝajne, de ĉi tiu Sankt-Georga nokto, ĉar ĉi tio estas mia tempo, la nura kiu min koncernas. Mia frato estis jam dek tagojn kuŝanta mallibera en la fortreso.

Mi marŝis laŭ la stratoj tiun tagon, antaŭ la krepuskiĝo, la hieraŭon de la Sankta Georgo, amara kaj maltrankvila supermezure. Tamen mi aspektis kvieta, je tio oni alkutimiĝas, mi iris per paŝo kiu ne malkovras la ekscitiĝon, la korpo nur pensas pri tiu kaŝado, lasante al mi la liberon en la tenebro de meditado kiu ne vidiĝas, esti tia kia mi volas. Plej volonte mi volas. Plej volonte mi formarŝus ekster la kasabon, en ĉi tiu silenta vesperiĝa horo, por ke la nokto min surprizu sola, sed la laboro kondukis min al la alia flanko, inter la homojn. Mi anstataŭis la malsanan hafiz-Muhamedon ; lin estis invitinta la maljuna Ĝaniĉ, nia bonfarinto. Mi sciis ke li kuŝas malsana jam de monatoj kaj ke li eble vokas antaŭ la morto. Kaj mi sciis ke lia bofilo estas la juĝisto Ajni-efendi, kiu skribis la mandaton por enkarcerigi mian fraton. Tial mi volonte konsentis iri, ion esperante.

Mi marŝis kiel kutime, dum oni gvidis min tra la korto, tra la domo, kutimiĝinta ne vidi tion, kio min ne koncernas ; tiel mi pli proksimas al mi men. Lasita en longa koridoro, mi atendis ke la sciigo pri mi alvenu tien, kie necesas, mi atente priaŭskultis la silenton, plenan, kvazaŭ neniu vivus en ĉi tiu granda konstruo, kvazaŭ neniu moviĝus laŭ la koridoroj nek en la ĉambroj. En la muto de la sordina vivado, ĉe l'agonianto kiu ankoraŭ spiras ie tie, en la neaŭdeblo de l'paŝoj kiuj formortas en la sterntapiŝo, kaj de l'mallaŭtaj interparoloj okazantaj flustre, kun apenaŭ aŭdebla pepo diskrakadis la malnova ligno de la fenestroj kaj de la plafonoj. Rigardante kiel la vespero malrapide zonas la domon per silkaj ombroj kaj tremas sur la vitroj kun la lastaj reflektoj de la taglumo, mi pensis pri la maljunulo kaj pri, kion mi diros al li ĉe la lasta vidiĝo. Pli ol unufoje mi estis parolinta kun malsanuloj, pli ol unufoje forsendinta mortanton al la granda vojaĝo. La sperto konvinkis min, se por tio necesas ia sperto, ke ĉiu sentas timon antaŭ tio, kio lin atendas, antaŭ la nekonateco kiu jam pulsas, nemalkovrita, en la stupora koro.

Mi diris, konsole :

La morto estas sendubeco, nepra prikono, la nuro pri kio ni scias, ke ĝi nin trafos. Esceptoj ne estas, nek surprizoj, ĉiuj vojoj kondukas al ĝi, ĉio, kion ni faras estas preparo por ĝi, preparo jam kiam ni ekĝemas novnaskite, frapante la frunton al la planko, ĉiam pli proksimaj al ĝi ni estas, neniam pli lontanaj. Do, se ĝi estas certo, kial ni miras kiam ĝi venas. Se ĉi tiu vivo estas mallonga paso, kiu daŭras nur horon, aŭ tagon, kial ni batalas por ĝin longigi ankoraŭ je tago aŭ horo. La tera vivo estas trompa, la eterno estas pli bona.

Mi diris :

Kial viaj koroj tremas pro timo kiam en l'antaŭmortaj suferoj la kruroj implikiĝas unu ĉirkaŭ alia ? La morto estas transloĝiĝo el unu domo en alian. Ĝi ne estas malapero sed dua naskiĝo. Samkiel splitiĝas ovoŝelo kiam kokideto plene disvolviĝis, tiel ankaŭ venas por animo kaj korpo la tempo disiĝi. La morto estas necesa en la nepro de transpaso en alian mondon, en kiu la homo atingas sian plenan ascendon (3).

Mi diris :

La morto estas disfalo de la materio sed ne de la animo (3).

La morto estas ŝanĝo de stato. La animo komencas vivi sola. Dum ĝi ne estis disiĝinta de la korpo, ĝi akceptis mane, ĝi rigardis okule, ĝi aŭskultis orele, sed la esencon de la aferoj ĝi sciis per si mem.

Mi diris :

En la tago de mia morto, kiam portiĝos mia tabuto,
ne pensu ke mi sentos doloron je ĉi tiu mondo.
Ne ploru kaj ne diru : domaĝe, domaĝe.
Se kazeiĝas la lakto, pli grandas la domaĝo.
Kiam vi vidos ke min oni kuŝigas en la tombon, mi ne [malaperos.
Ĉu la luno kaj la suno malaperas kiam ili subiras ?
Al vi ĝi ŝajnas morto sed ĝi estas naskiĝo.
La tombo ŝajnas al vi karcero, dum fariĝis libera l' [animo.
Kiu semo ja ne ĝermas, kiam en teron metita ?
Kaj do kial vi dubu pri la semo homa ?

Mi diris :

Estu danka, hejmo Davida. Kaj diru : venis la vero. Venis la horo. Ĉar ĉiu rondiras laŭ sia orbito ĝis difinita templimo. Kreas vin Dio en la uteroj de viaj patrinoj, kaj el unu formo en alian transmuldas, en trioble opaka tenebro. Ne tristu, ĝoju pri la paradizo al vi promesita. Ho, sklavoj miaj, ne estas hodiaŭ por vi timo, kaj vi ne estos malĝojaj. Ho, kvietiĝinta animo, reiru al via mastro kontenta, ĉar li estas pri vi kontenta. Eniru inter miajn sklavojn, eniru en mian paradizon.

Mi tiel parolis sennombrajn fojojn.

Sed nun mi ne estas certa ke tion mi devas diri al la maljunulo kiu min atendas. Ne pro li, sed pro mi mem. La unuan fojon — kiom da fojoj dum ĉi tagoj mi diros : la unuan fojon ? — la morto ne ŝajnis al mi tiel simpla kiel mi kredis kaj kiel mi la aliajn konvinkadis. Okazis al mi, ke mi faris teruran sonĝon. Mi staris en malplena spaco super mia morta frato, la tabuto kovrita de blua seriko longis antaŭ miaj piedoj, ĉirkaŭ mi la homoj formis ringon, malproksime. Neniun mi vidas, neniun mi konas, mi scias nur ke oni fermis la rondon ĉirkaŭ ni kaj lasis min sola, en la suferiga silento super la mortinto. Super la mortinto, al kiu mi ne povas diri : kial tremas via koro ? Ĉar ankaŭ mia koro tremas, timigas min la surda senbrueco. Dolorigas min sekreto kies sencon mi ne vidas. Ĝi havas sencon, mi diris, defendante min antaŭ la teruro, sed mi neniel sukcesis ĝin eltrovi. Leviĝu, mi diris, leviĝu. Sed li estas kovrita de mallumo, en la nebulo de la malaperado, en verdeta obskuro, kiel sub la akvo, droninto de nekonataj vastoj.

Kiel mi nun diru al agonianto : Iru obeeme laŭ la vojoj de via Sinjoro. Dum frostotremo min ekkaptas pro tiuj kaŝitaj vojoj, pri kiuj mia etega scio eĉ konjekton ne havas.

Mi kredas je la lasta juĝo kaj je la eterna vivo, sed mi komencis kredi ankaŭ je la hororo de l'mortado, je la timo kontraŭ tiu netravidebla nigro.

---

(1) **Moto tirita el la Korano.**

(3) **Laŭ la Islamaj pensuloj kaj poetoj Ragib Isfihani,** Ibn Sina, Imani Gazali, Mevlana Ĝevaludin.

GLOSARO

hafiz : honortitolo starigata antaŭ la nomo de tiu kiu parkere povas reciti la Koranon/turke/

— **efendi :** sinjoro, moŝto /uzata post la nomo/ /turke/

tabuto : ĉerko /turke/

el la serbo kroata esperantigis
R. Imbert

LA BERNAJ URSOJ

La Urbo Berno estas fondita en la jaro 1191, de Bertolo V-a, duko de Zähringen. Tuj kiam ĝi estis finita, ĉirkadita de muroj kaj provizita de pordegoj, li penis por imagi nomon al la jus konstruita urbo, kun zorgemo simila je tiu de patrino serĉanta nomon por sia ĵus naskita infano. Bedaŭrinde, ŝajnas, ke imago ne estis la ĉefa eco de la nobela Sinjoro, ĉar, ne sukcesinte trovi, kion li serĉis, li kunvenigis por granda festeno la tutan apudloĝantan nobelaron. La festeno daŭris tri tagojn, post kiuj nenio estis ankoraŭ decidita pri la baptonomo de la infanurbo, kiam unu el la kunmanĝantoj proponis, por trovi solvon, fari, la morgaŭan tagon, grandan ĉasadon en la ĉirkaŭantaj montoj, kaj uzi por la urbo la nomon de la unua mortigita besto. La propono elvekis bruajn laŭdkriojn. La morgaŭan tagon, oni foriris tuj je la ektagiĝo. Post unu horo de ĉasado, laŭtaj venkaj krioj aŭdiĝis ; la ĉasistoj kuris al la brua loko : duka pafarkisto estis ĵus trafinka cervon. Bertoldo estis tre malkontenta, tial ke unu el liaj servistoj estis mortiginta tiaspecan beston. Li decidis, ke li ne almetos je sia bona kaj forta militurbo la nomon de besto, kiu estas simbolo de timemo. Ŝerculoj pretendis, ke ne tio estas la vera kaŭzo de la duka antipatio al cervo ; ĉi tiu besto estas ankaŭ simbolo de alia afero, pri kio Lia Moŝto ne ŝatis paroli. La leganto bone komprenos, kiam mi diros, ke Bertoldo estis maljuna kaj havis junan kaj belan edzinon.

Oni do decidis, ke la cerva trafo estas ne akceptinda, kaj oni daŭrigis la ĉasadon. Vespere la ĉasistoj renkontis urson (urso, germane Bär elparolu Ber).

Bonege[e]! jen besto, kies nomo povas endanĝerigi honoron nek viran, nek urban. La malfeliĉulo estis mortigata senkompate kaj baptis per sia sango la naskiĝintan ĉefurbon.

Ankoraŭ nun, ŝtono starigita apud la pordo de la tombejo Muri-Stalden, cetigas la aŭtentikecon de ĉi tiu etimologio per mallonga, sed preciza surskribo, en malnova germana lingvo, kiu signifias : « Unua urso ĉi tie kaptita ».

Feliĉoj kaj malfeliĉoj de la Ursoj

Supre ni rakontis kiel, post sia fondo de la duko de Zähringen, Berno ricevis nomon kaj kiamaniere la besta speco partoprenis en ĝia bapto. De tiu ĉi tempo ursoj fariĝis insignoj kaj oni decidis, ne sole starigi iliajn figurojn sur la blazonon, sur la fontanojn, sur la horloĝojn kaj monumentoj, sed ankaŭ kapti vivantajn ursojn, nutrotajn kaj loĝotajn je la kosto de la urbanoj. Facila afero : sufiĉis iri en la monton kaj elekti. Du junajn ursidojn oni kaptis kaj kondukis en Bernon, kie ili fariĝis, pro sia gracieco kaj gajeco, adorataj por la urbaj burĝoj.

Tiutempe mortis maljuna fraŭlino tre riĉa, kiu en la lastaj jaroj de sia vivo estis montranta kontraŭ ĉi tiuj amindaj bestoj tute apartan amon[e] ; ŝiaj heredontoj estis nur malproksimaj parencoj. Oni malfermis ŝian testamenton kun kutimaj formalaĵoj en ĉeesto de ĉiuj interesuloj. Ŝi lasis sesdekmil-funtan renton al la ursoj kaj milskudan kapitalon al la Berna hospitalo. La parencoj faris proceson, plendante pri instigado al la donintino ; oni elektis advokaton por la ursoj ; ĉar li estis talentoplena viro, la senkulpeco de la malfeliĉaj kvarpieduloj, kiujn oni intencis rabi, estis publike konfesata ; oni deklaris, ke la testamento estas bona kaj laŭleĝa kaj oni permesis al la heredintoj tuj ĝui sian heredaĵon.

La afero estis facila ; la havo de la donintino konsistis nur el mono. La dekducentmil-franka kapitalo estis enkasigata de la Berna trezoro, kiu devis preni sur sin la pagadon de la procentoj al la leĝaj zorgantoj de la heredintoj, konsiderataj kiel nematuraĝuloj. Kompreneble, grava ŝanĝo okazis en la vivmaniero de ĉi tiuj lastaj. Iliaj zorgantoj aĉetis domon kaj kaleŝon ; je la nomo de la ursoj ili invitis eminentulojn al bonaj festenoj kaj brilantaj baloj. Koncerne la bestojn, ilia gardisto ricevis la titolon : « Ursa ĉambristo » kaj de ĉi tiu tempo ilin batis nur per bastono kun ora bulo.

Bedaŭrinde ĉio estas ŝanĝema en homaj aferoj ! Kelkaj ursaj generacioj estis ĝuintaj ĉi tiun komforton ordinare nekonatan en ilia raso, kiam okazis la franca revolucio. La historio de niaj temuloj ne estas sufiĉe ligata kun ĉi tiu granda katastrofo, por ke ni serĉu ĝiajn kaŭzojn en la estinteco aŭ sekvu ĝin en ĝiaj rezultatoj ; ĉi tie ni priparolos nur la okazaĵojn, en kiuj ili ludis rolon.

Ĉar Svisujo limtuŝas Francujon, devige ĝi estis atingita de la granda tertremo, per kiu la revolucia vulkano skuis la mondon[e] ; tamen ĝi volis kontraŭstari ĉi tiun militan lafon, kiu trafluis Europon.

La kantono Vaud proklamis sian sendependecon ; Berno kunigis siajn soldatojn ; unue venkinta apud Neueneck, ĝi estis venkata en la bataloj apud Straubrunn kaj Grauholz kaj la venkintoj, komandataj de generaloj Brune kaj Schaunburg, solene eniris la ĉefurbon. Post tri tagoj, la Berna trezoro malsolene eliris.

Dekunu muloj ŝarĝitaj de oro ekvojiris al Parizo ; du el ili portis la havon de la malfeliĉaj ursoj, kiuj, kvankam moderaj en siaj opinioj, estis enskribitaj en la liston de aristokratuloj kaj sammaniere punitaj per biena konfiskado.

Granda ekzemplo de filozofio estis liverata al la homoj de ĉi tiuj noblaj bestoj ; ili montriĝis tiel decoplenaj en la malfeliĉo, kiel simplaj en la feliĉo, kaj travivis, respektataj de ĉiuj politikaj partioj, la kvin revoluciajn jarojn, kiuj skuis Svisujon de 1798 ĝis 1803.

Tuj kiam Berno retrovis kvieton, ĝi penis por flegi la perdojn faritajn de ĝiaj ŝtatanoj. Unuj petis pri registara ofico, aliaj postulis monan kompenson, ceteraj volis nacian rekompencon. Nur la ursoj, kiuj raite povis aspiri al ĉio, faris nenian klopodon kaj atendis en silento, ke la respubliko zorgu pri ili.

La respubliko pravigis sian belegan devizon : « Unu por ĉiuj, ĉiuj por unu ». Oni starigis monoferadon por la ursoj ; sesdek mil frankoj estis kolektataj. Per ĉi tiu sumo tre malgranda kompare kun ilia antaŭa havo la urba konsilantaro aĉetis bienon, kiu produktis jaran renton dumilfrankan.

Baldaŭ ĉi tiu malgranda havo estis duonigita pro alia okazaĵo tute ne politika. La fosaĵo, en kiu loĝis la ursoj, estis en ĉi tiu tempo interne de la urbo kaj limtuŝis la malliberejajn murojn. Unu nokton malliberulo kondamnita je mortpuno sukcesinte akiri feran pintilon, komencis la truadon de l'muro ; post du aŭ tri horoj da penado li aŭdis, ke iu, aliflanke de l'muro, faras similan laboron ; tio lin kuraĝigis. Li opiniis, ke alia malfeliĉa malliberulo loĝas en apuda karcero kaj li esperis, ke post kuniĝo ili forkuros pli facile duope. Ĉi tiu espero kreskis kun la antaŭeniĝo de l'tasko ; la nevidebla laboranto laboris kun tia energio, ke li tute malatentis ĉiujn singardojn ; la elprenitaj ŝtonoj brue ruliĝis ; li spiris tutblove. La malliberulo konsekvence ankoraŭ pli rapidis, ĉar li opiniis, ke la senprudenteco de lia kunulo povas kaŭzi la malkovron de ilia entrepreno. Feliĉe la truo estis preskaŭ traborita. Dika ŝtono ankoraŭ kontraŭstaris ĉiujn penadojn, kiam li konciis, ke ĝi moviĝas ; post kvin minutoj, ĝi ruliĝis aliflanken.

Freŝa aero enfluis la karceron ; li konsciis, ke ĉi tiu neesperita helpo venas el ekstere ; por ne perdi tempon, li enŝovis sin en la mallarĝan elirejon, kiu estas naskita laŭ maniero tiel stranga. Mezvoje li renkontis unu urson, kiu, siaflanke, multe penadis por eniri la karceron. La besto estis aŭdinte la bruon faritan de la malliberulo interne de la enfermejo kaj puŝita de ĉi tiu detrua instinkto posedata de la nehomaj estaĵoj, ĝi penis por helpi la laboron.

La kondamnito staris inter du danĝeroj : pendiĝado aŭ englutiĝo ; la unua estas certa, la dua ebla ; li elektis la duan kaj sukcesis eldanĝeriĝi. La urso, impresita de la spirita potenco, per kiu homo ĉiam superas eĉ la plej kruelan beston, ne malhelpis lian forkuradon. La morgaŭan tagon la ŝlosisto, enirante la karceron, konstatis strangan aliformiĝon de l'malliberulo : anstataŭ homo urso kuŝis sur la pajlo.

La ŝlosisto forkuris, ne ferminte la pordon ; la urso lin sekvis kun grava mieno kaj, ĉar ĉiuj elirejoj estis malfermataj, ĝi alvenis ĝis la strato kaj kviete sin direktis al la herbvendejo. Oni bone divenas, kian efekton faris al la vendistoj ĉi tiu nova kliento. Post unu minuto la placo fariĝis senhoma, kaj la ĵus alveninto povis elekti el la dismetitaj fruktoj kaj legomoj la plej ŝatatajn de si. Ĝi bone uzis la tempon kaj anstataŭ foriri en la monton, kies alvojon neniu kredeble estis baranta al ĝi, ĝi faris festenon de pomoj kaj piroj, fruktoj, kiuj estas la plej ŝatata de ĉiuj ursaj sinjoroj. Ĝia glutemo estis kaŭzo de ĝia malfeliĉo.

Du forĝistoj, kies laborejo troviĝis sur la placo, elpensis rimedon, por rekonduki la forkurinton al ĝia fosajo. Ili hejtis, preskaŭ ruĝvarme, du grandajn tenilojn kaj, alproksimiĝante al la ŝtelisto en la momento, kiam ĝi estis plene okupata pri sia manĝo, ili vigle ĝin pinĉis ĉiu po unu orelo.

La urso tuj konsciis, ke ĝi estas kaptita ; tial ĝi tute ne kontraŭstaris kaj humile sekvis siajn kondukantojn, nur protestante per kelkaj plendaj krioj pro la kontraŭleĝaj rimedoj uzitaj por ĝin aresti.

Ĉar la Berna konsilantaro opiniis, ke simila afero povos denove okazi, kaj eble ne havos tian paceman finon, tial ĝi decidis, ke oni transportos la ursejon eksterurben kaj konstruos du fosajojn en la remparoj.

Ankoraŭ nun la ursoj loĝas en ĉi tiu loko, sed la konstruado de ilia nova loĝejo deprenis duonon de ilia kapitalo, ĉar ĝi kostis tridek mil frankojn, kaj por akiri ĉi tiun sumon oni devis hipotekigi ilian bienon.

Alexandre DUMAS
el la franca lingvo tradukis Ursulo
L. I. 1913

LA VENĜO

Estis belega varma somervespero en Tampere, kaj la urbcentro estis plena de pasumantaj homoj ĝuantaj la postlaborajn horojn. Kelkaj sencele vagadis, aliaj rigardis en montrofenestrojn sur la ĉefstrato, kaj ĉie gejunuloj amindume promenadis brak-en-brake.

Subite motorciklo haltis vidalvide al kafejo, antaŭ kiu staris grupo da babilantoj kaj ridantaj junaj paroj. Altstatura blonda viro kun variolmarkita vizaĝo saltis sur la trotuaron kaj iris renkonte al unu el la paroj. Irja, la junulino, antaŭsentante, ke io malbona okazos, ekkriis. Lauri, ŝia kunulo, prenante ŝian manon, provis forkuri, sed la longa brako de la motorciklisto baris al li la vojon.

« Lasu lin, Vilho », protestis la timigita junulino.

« Vi, hundido, kion vi faras tie ĉi ? Ĉu vi ne scias, ke ŝi estas *mia* knabino ? » muĝis Vilho. Li kaptis la ĉemizkolumon de Lauri per unu mano, kaj pugne kunpremante la alian, minace demandis : « Ĉu vi foriros, aŭ ĉu mi devos traviŝi la straton per via sentaŭga kadavraĉo ? » Ne atendante respondon, la agresema blondulo trafis la vizaĝon de Lauri per pugnobato, kiu ŝancelis la atakiton.

Irja vane provis fortiri Laurin, kies ĉemizo jam komencis ŝiriĝi pro la tenajla preno de la atakanto. « Je la nomo de Dio, lasu lin, frenezulo. Ne kredu, ke mi interesiĝas pri vi, ĉar mi dancis kun vi unu fojon pasintan sabaton ».

Tiu deklaro de Irja efikis furiozige je Vilho, kaj forpreninte la manon, kiu pinĉe tenegis Laurin, li komencis ambaŭpugne marteladi sian rivalon surkape kaj korpe. Por defendi sin Lauri delasis la manon de Irja, kaŭriĝis kaj provis forturni la pistantan pugnadon per siaj brakoj.

Amaso de scivolaj preterpasantoj jam ariĝis ĉirkaŭ la du luktantoj. Tuj elpaŝis kvar fabriklaboristoj, kiuj evidente havis sperton pri ĉi-specaj stratbataloj. Ili tiris flanken la du kontraŭulojn kaj trenis ilin al apuda aŭtobushaltejo. La hurlanta kaj ankoraŭ baraktanta Vilho estis bruske ŝovita sur veturilon irantan norden, dum Lauri, tute sen rezisto, estis sidigita en aŭtobuso, kies celo estis la suda parto de la urbo. Post la foriro de la du ĉefrolantoj, la spektantaro same rapide malaperis, kaj amikino akompanis hejmen la plorantan Irjan. Kiam policanoj alvenis dek minutojn poste, nur la sangmakulita trotuaro atestis la misfaron, kaj ilia sola oficiala ago estis noti la registronumeron de la motorciklo kaj skribi monpunan slipon pro kontraŭleĝa parkumo sur la ĉefstrato.

En sia luita ĉambro Lauri forprenis la ĉifonitan ĉemizon kaj iris al la banĉambro lavi sian kontuzitan vizaĝon kaj pansi la ankoraŭ sangantajn vundojn. Dume, en sia nun malpli doloranta kapo li komencis kovi venĝon kontraŭ Vilho. Lauri hazarde ekvidis sur la planko sub la lavabo skatolon da ratveneno, kiun la domnastrino antaŭ nelonge aĉetis por liberigi la kelon de tiuj bestetaĉoj. « Ĝi taŭgas ankaŭ por alia besto », ekpensis la junulo, kaj li ne devis tro longe streĉi sian cerbon por meti tiun mortigilon en sian refrap-planon.

Li portis el sia ĉambro duonplenan botelon da biero, enversis kvanton da raticido sufiĉan por mortigi eĉ ĉevalon kaj poste plenigis la botelon ĝisrande per akvo. Zorge remetinte la kovrilon, li skuis la miksaĵon kaj kontente rigardis, kiel la pulvoro tute solviĝis. La bruna koloro de la botelvitro helpis kaŝi la konsiston de la toksa trinkaĵo.

Vilho laboris en la sama fabriko, kie Lauri kaj ankaŭ Irja estis dungitaj, do la plenumado de la venĝoplano estis relative facila afero, almenaŭ teorie. La sekvan tagon Lauri portis la botelon al sia laborejo kaj kaŝis ĝin en sia vestoŝranko. Dum la lunĉpaŭzo, kiun la laboristoj kutime pasigis en la ĝardeno de la fabriko, Lauri ensakigis la botelon kaj iris serĉi Vilhon. Tiu ĉi sidis sur benko kartludante kun aliaj viroj. Lauri alproksimiĝis, salutis lin kaj proponis la bieron kiel simbolon de repaciĝo. Vilho ekrigardis la botelon kaj, ĉu suspektante artifikon, ĉu agante pro denaska malico, ekstaris, fulmorapide tiris la botelon el la sako kaj per vasta braksvingo jetis ĝin kontraŭ la malantaŭan brikmuron. La frakasiĝantaj vitropecoj eniĝis kun la raŭkaj ridegoj de Vilho. « Jen, trinku ĝin vi mem ! » li rikanis. Eksplodo de rido venis de la laboristoj, kiuj observis la amuzan spektaklon. Sub la leŭkoplastoj la violkoloraj ŝvelintaj vangoj de Lauri ruĝiĝis pro tiu ĉi dua publika humiligo, kiun li ricevis de Vilho.

Tiun posttagmezon Lauri ankoraŭ ne kuraĝis serĉi Irjan por ekscii, kion ŝi opinias pri la okazintaĵo de la antaŭa vespero. Li povas pensi nur pri venĝado. Pluraj planoj trakuris lian turmentitan menson, kaj se eĉ la plej malsevera el ili efektiviĝus, li riskus plurjaran malliberigon. Tamen, en sia nuna stato, la junulo tute ignoris tiujn sekvojn, kaj li fine tiris la konkludon, ke Vilho meritas la plej drastan punon. Li memoris pri la intrigo de televida filmo tementa ĝuste pri venĝo. Kokrita edzo elpensis perfektan krimon por mortigi sian edzinon. Informiĝinte, ke ŝi intencis aŭtomobile vojaĝi al najbara urbo, plej verŝajne por rendevuo kun sia amanto, la edzo malstreĉis kelkajn ŝraŭbojn de la aŭtomobila stirilaro. La virino malfacile povis direkti la veturilon, okazis karambolo, kaj ŝi mortis. Tamen, sperta esplorado fare de la polico malkovris, ke la stirrado estis tuŝaĉita, kaj kiam ili trovis, ke ŝraŭbŝlosilo mankis en la ilujo, ili rapide solvis la krimon.

Lauri decidis agi plimalpli laŭ la scenaro de la filmo. Li difektos la motorciklon de Vilho, por ke la aĉulo suferu akcidenton. La ĉefproblemo nun estas akiri ŝraŭbŝlosilon. Li devas esti tre singardema, por ke oni neniam povu spuri ĝin al li. La plej simpla maniero fari tion, li pensis, estas forpreni unu el la fabrika ilar-deponejo kaj poste remeti ĝin, kompreneble forvišante ĉiujn fingropremaĵojn

por malhelpi daktiloskopian esploron. Li atendis la posttagmezan kafpaŭzon kun la espero, ke li povos eniri la ilar-ĉambron nevidite. Li rapide trovis la taŭgan ilon, sed li ne kalkulis kun la frua reveno de la deponeja dejoranto.

« Kion vi faras tie ĉi ? » grumblis la maljunulo. « Ĉu vi ne scias, ke estas malpermesite pruntepreni ilojn sen enskribi vian nomon en la kajeron ? »

Lauri senvorte remetis la ilon en la ŝrankon kaj pafis sin for preter la mirfrapita viro.

Jam estis la fino de la labortago, kiam Lauri decidis alimaniere akiri la ilon bezonatan por realigi sian venĝoplanon. La sola ebleco estis aĉeti ĝin. Li iris al la veturilparkumejo, suriĝis sur sia biciklo kaj rapide pedalis en la direkto al la urbcentro. Li intencis doni kelkajn markojn al stratbubo, por ke tiu ĉi aĉetu la ŝraŭbŝlosilon. Tiel neniu povos scii, ke li akiris ĝin. Haltante antaŭ granda magazeno, li konsterniĝis. Ĝi estis fermita.

« Kio okazis ? » li demandis florvendistinon en apuda kiosko. « Kioma horo estas ? ».

« La kvina kaj dek » ŝi respondis. « Vi malfruas. Oni jam fermis ĉiujn vendejojn ».

Lauri mienis eĉ pli kolere, ĉar samtage fiaskis du provoj satigi lian venĝemon.

« Ankaŭ mi baldaŭ fermos la kioskon », aldonis la floristino. « Rigardu, junulo », ŝi vokis, kiam li residiĝis sur la biciklo. « Ĉu vi ne volas aĉeti bukedon ? Mi ne deziras porti la restantajn florojn hejmen. Jen, mi donos al vi ĉiujn kontraŭ nur dek markoj ». Ŝi etendis al Lauri densan aron da buntaj diversspecaj floroj. « Portu ilin al via amikino. Vi certe ricevos unu kison por ĉiu floro ».

Lauri ne bezonis tro da persvado. Elpoŝigante plenmanon da moneroj, li denombris la ĝustan sumon. Kun la bele envolvita bukedo enmane, li biciklis rekte al la domo de Irja.

Apenaŭ ĝirante ĉe la angulo de la strato kondukanta al lia celo, li ekvidis la motorciklon de Vilho antaŭ la domo de la junulino. Vilho apogis sin ĉe arbo kaj rigardadis al la fenestroj de la domo. De tempo al tempo li iris al la motorciklo kaj hupis por altiri la atenton de Irja.

Lauri restis sur la transa trotuaro por eviti novan alfronton kun tiu ŝajne nevenkebla antagonisto. Iu flankentiris la kurtenon ĉe fenestro de la dua etaĝo. Lauri spirhalte atendis, esperante, ke Irja vidos lin. Li svingetis la bukedon kaj ankaŭ mansignis. Ŝi delasis la kurtenon. Poste malfermiĝis la dompordo kaj Irja, tute ignorante la motorcikliston, kuris trans la straton. Prenante la bukedon, ŝi brakumis Laurin kaj kisis lin.

Tion sufiĉis por Vilho. Li sidiĝis sur sia veturilo, spronis la startigilon kaj stakatbrue forrajdis. Kiam li estis nur nigra polvero en la fora distanco, Lauri ankoraŭ ricevis varmajn kisojn de Irja, kaj tiam li komprenis, kial oni diras, ke la venĝo estas dolĉa.

Bernard GOLDEN.

HOMAMASO

Sinjoro Spalner metis siajn manojn sur sian vizaĝon ... La aŭtomobilo kaj la muro leviĝis ; renversiĝis kaj renversiĝis, kvazaŭ ludilo... kaj li estis forĵetita eksteren...

Kaj estis silento.

Jam, ili kuris, kuris...

Kuŝa sur la strato, li, kvazaŭ sonĝe, aŭdis ilin kuri... Ilian aĝon, ilian staturon, li povis diveni, pro la bruo de iliaj piedoj, de iliaj pli kaj pli multaj piedoj sur la somera herbo, sur la slaboj de la trotuaro, sur la asfalto de la ŝoseo, eĉ sur la brikoj de la renversigita muro. Sur la nokta ĉielo, li vidis sian veturilon duone alkroĉitan sur la parto de la muro, kiu ankoraŭ staris. Kaj ĝiaj radoj turniĝis, ankoraŭ turniĝis, daŭrigis turniĝi.

Tiu popolamaso !! El kie ĝi venis ? Li ne sciis. Li luktis por resti konscia.

Kaj la vizaĝoj, pli multaj, pli kaj pli preme, ĉirkaŭis lin. Super lia kapo, ili formis densan cirklon, moviĝantan, glitantan, ŝanĝiĝantan, kliniĝantan al li. Ili rigardis, akre rigardadis. La okuloj konjektis : ĉu li spiras ? ĉu li vivas ? ĉu la ambulanco alvenos sufiĉe frue ? ĉu li mortos ?

Super li, jen junulo pala, maldika, kiu glutas sian salivon, kiu mordas al si la lipojn. Jen ankaŭ malgranda virino kun tro da ruĝo sur la vangoj, tro da ruĝo sur la lipoj kaj knabeto kun lentugoj sur la nazo. Tute apude : maljunulo kun longaj grizaj haroj, kaj maljunulino kun griza nevuso sur la mentono.

Ĉiuj, el kie ili venis ? tiel rapide ?... El la domoj, el la aleoj, el la veturiloj, el la najbaraj stratoj, el la ĉirkaŭajoj skuitaj de la akcidento. El la hoteloj, el la tramoj el la aŭtobusoj... El ĉie ili venis, ili ŝprucis. Plej rapide ĉirkaŭ lin, por gvati, por sondi, por enketi, por demandi, por fingre montri, por konjekcii, por laŭtvoĉe esprimi maldecajn scivolojn... por ĝeni, por malserenigi la intimecon de unu agonio.

Li tute malamis tiujn rigardaĉojn. En ili estis io maldeca, malbona, eĉ io pli danĝera ol la akcidento mem.

Fajfilego, voĉo de policisto. Translokiĝo. Iom da sango fluis et liaj lipoj dum oni transportas lin en la ambulancon. Iu diris : « ĉu li mortis ? Iu alia respondis. Ne, li ne estas mortinta. Tria voĉo aldonis : li ne mortos ».

La pordoj de la ambulanco klakis. Tra la fenestroj, li vidis la homamason, kiu rigardas, avide rigardas internen. Li vidis sur la vizaĝoj, ke li ne mortos.

La ambulanco foriris ; li lasis sin malantaŭen. Tamen, duone senkonscia, li ankoraŭ vidis tiujn okulojn, kiuj rigardis lin plenvizaĝen.

Ankaŭ la radojn de la veturilo li vidis : unu radon, du radojn, kvar radojn... kiuj turniĝis, vibris, zumis, turniĝadis... turniĝadis... turniĝadis... La radoj, kiuj turniĝis... la piedoj, kiuj kuris... la vizaĝoj, kiuj miksiĝis, turniĝis kiel la radoj de la veturilo.

Li vekiĝis.

Suno ; ĉambro de hospitalo. Mano, kiu palpas lian pulson...

— Kiel vi sentas vin ? demandis la kuracisto.

La radoj estas malaperintaj. S-ro Spalner rigardas ĉirkaŭ sin. Li povas trovi vortojn. Pri la akcidento :

— Doktoro ! Tiu Homamaso ! Mi scias ! Mi bedaŭras ; mi tro rapide kondukis ; mi grimpis sur la trotuaron kaj faligis la muron. Mi estis vundita kaj preskaŭ senkonscia. Sed tiu popolamaso ! kiu kuris... kiu kliniĝis super min... kiu akre observis min. Kaj tiuj radoj, kiuj turniĝis, tiel rapide turnigis !!

— Ne turmentiĝu, diras la kuracisto. Estas nur simpla nerva ŝoko. Vi, nun, fartas plej bone kiel eble.

Du semajnoj pli poste, li forlasas la hospitalon.

Li revenas hejmen en taksio. Subite la ŝoforo bremsas :

— Ha ! li diras, ankoraŭ unu akcidento ; ĉu mi devas laŭiri alian straton ?

— Ne, respondas Spalner, ni vidu, kio okazis.

Hupante, la taksio antaŭeniras.


— Ĉu vi vidas ? diras la ŝoforo ; ĉiuj tiuj homoj ! ŝajnas, ke estas ilia propra patrino, kiu estis mortigita !

— Kiel terure rapide ili alvenis, respondas Spalner.

— Estas same por incendio aŭ eksplodaĵo. Estis neniu. Bum ! io okazas. Kaj, tuj, estas enorma popolamaso ĉirkaŭe !

Amiko atendis lin en lia hejmo. Spalner rakontas la akcidenton, kiun li ĵus vidis sur la strato.

Subite granda metala bruo rapidigas ilin al la fenestro : ĵus karambolis granda ruĝa aŭtomobilo, kamiono, bicikloj ; 4-5 sekundojn poste : jen homoj, kiuj kuras el ĉie ; 10-11 sekundoj : kaj ili alvenas ; 17-18 sekundoj kaj



ĉi tie : homoj, veturiloj... hupoj ! 20 sekundojn : densa homamaso ĉirkaŭas kuŝan virinon ! Spalner ankaŭ alkuras. Li volas vidi, de tute proksime ; jen ĉi tie, virino kun tro ruĝaj vangoj, tro ruĝaj lipoj ; jen pala junulo, kiu mordas al si la lipojn ; jen knabeto kun lentugoj sur la nazo.

La homamaso spiras, rigardas, frotas la piedojn, miksiĝas, grumblas, moviĝas, laŭtvoĉe parolas :

— Ĉi ŝi estas mortinta ?

— Ŝi estos mortinta, kiam la ambulanco alvenos. Ili ne devos movi ŝin.

Dum monatoj, Spalner eltondis el la ĵurnaloj la artikolojn pri la surstrataj akcidentoj. Tio, kion li rigardis sur la fotoj estis ne la veturilojn, sed la ĉirkaŭantojn. Li serĉis... kaj li trovis, la virinon tro ruĝe ŝmikitan, la palan junulon, la knabeton kun lentugoj... kaj la aliajn.

Kial la samaj personoj ? ĉu ili amis fortajn emociojn ? morbidajn sensaciojn ?

Kial ili estis movintaj tiun virinon ? ĉu ili deziris, ke ŝi mortu ?

Spalner nepre volis porti sian dosieron al la polico. Por trairi la urbon, li malrapide veturas : « Ke mi alvenu vivanta », li diras al si.

Tamen, apenaŭ surprizas lin la kamiono, kiu ŝprucas el aleo. La veturilo de Spalner estas puŝita dekstren, maldekstren. La ventoŝirmilo marteladas al li la vizaĝon. Li mem estas ĵetita antaŭen, malantaŭen. Subita silento. Kaj la doloro plenigas lin tutan.

Li jam aŭdas la piedojn, kiuj kuras... kuras. Li palpas la pordon, kiu malfermiĝas. Li falas sur la ŝoseon, kiel ebria viro. Lia orelo, ĉe la asfalto, aŭdas ilin veni, kvazaŭ pluvego kun multaj, multaj gutoj, pezaj, duonpezaj, leĝeraj, sur la straton.

Ili alproksimiĝas, ili alvenas, ili estas ĉi tie. Kaj li malfermas la okulojn. La homamaso rigardas. Li sentas iliajn spiron la odorojn miksitajn de multaj homoj, kiuj suĉas, kaj suĉas la aeron ĉirkaŭ lia anhelanta vizaĝo. Vane li provas diri : malantaŭeniru, malantaŭen... mi volas spiri. Lia kapo enorme sangas. Li provas geston, sed li konstatas, ke io estas rompita en lia spino. Li ne plu kuraĝas provi movon. Li ne plu povas paroli. Iu diras : « Helpu min ; ni lin turnos kaj kuŝigos en pli komfortan pozicion ».

La cerbo de Spalner krias : « Ne ! ne tuŝu min ! »

Sed neniu vorto eliras. Nur naŭzo sufokas lian balbuton. Du viroj alproksimiĝas : ilin, li bone konas ; estas la maldika, pala junulo kaj la maljunulo kun longaj grizaj haroj.

Li retroviĝas sternita, rekta kiel paliseto, en agonio de sufero. Familiara voĉo diras : « ĉu li... ĉu li estas mortinta ? » Alia konata voĉo respondas : « Ne, ankoraŭ ne, sed li estos mortinta, kiam la ambulanco alvenos ».

Antaŭ tiu muro de homaj vizaĝoj, li ĵetas neaŭdeblajn kriojn de vundita besto.

Kaj denove super li, li vidas, sub haroj, sub ĉapeloj, brilajn okulojn. Li rekonas la virinon kun tro da ruĝo sur la vangoj, sur la lipoj ; la knabeton kun lentugoj sur la nazo ; la maljunulinon kun nevuso griza sur la mentono. Li pensas : « Mi scias, kial vi estas ĉi tie. Vi volas esti certaj, ke tiuj, kiuj devas vivi vivos ; ke tiuj kiuj devas morti, mortos. Tial, vi movis min. Vi sciis, ke tio mortigos min. Kaj vi diros : « Oni ne sciis, ke estas danĝere transloki vunditon. Oni ne intencis noci al li ! ».

Jen longa hupo. La ambulanco alvenas. Spalner klare legas sur la vizaĝoj : « Estas tro malfrue ! »

de Ray Bradbury
en Antologio pri Fantasto.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO

Krucvortoj :

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	U	K	i	J	■	R	E	B	O
2	M	A	G	■	D	■	T	R	E
3	E	R	■	C	i	S	■	A	R
4	O	B	J	E	K	T	i	V	O
5	■	O	i	D	■	A	G	U	■
6	i	N	D	U	K	T	i	L	O
7	D	A	■	S	i	A	■	i	L
8	O	D	O	■	L	■	O	N	i
9	J	O	N	O	■	B	L	O	V



NOVA PROBLEMO

Krucvortoj (proponitaj de S-ro R. Raynaud)

HORIZONTALE :

I) Kromsalajro. — En robo.

II) Mortiga infekta malsano (R). — Respektinda restaĵo.

III) Malsaĝegulo. — Verba finaĵo. — En bovo.

IV) Boteleto (R). — Ĝi vokas al preĝejo (R).

V) Prefikso. — Duklapa molusko. — Fino de parolado.

VI) Rilata al hispana monero.

VII) Ĉe nia butontruo (R). — Nedefinita adjektivo.

VIII) Doni idojn. — Sufikso. — En Francio.

IX) Du vokaloj. — Monaĥo.

X) Parto de ĉeval - aŭ bovveturilo. — Franca Romo (R).

XI) Rilata al iu ajn cifero de la vertikalaj vortoj. — Sufikso. — Aŭtonoma ĝi estas civito (R).

XII) Analfabeto ne ĝin scipovas. — Havanta akretan guston.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
I										■		
II					■							
III							■			■		
IV					■							
V			■						■			
VI		■		■								■
VII	■							■			■	
VIII							■			■		
IX			■									
X		■							■			
XI						■			■			
XII					■							

(R) = nur radiko.

VERTIKALE :

1) Pinte ŝtala ileto de gravuristo (R). — Nepre okazonta (R).

2) Esenca fundamento (R). — Marŝi al. — Prefikso.

3) Pinglarbo. — Malagrabla impreso de seninteresiĝo (R). — Spaco da tempo (R).

4) Alkoholo en kiu oksigeno estas anstataŭata de sulfuro. — Analfabeto ne scipovas.

5) Maltima, aroganta.

6) La plej malvarma parto de fridujo.

7) En ia loko. — Alĝeria havenurbo (R). — Enkonduki iun en scio (R).

8) Franca rivero. — Eligi ion el io.

10) Malofta. — Numerala adverbo.

11) En formo de ovo. — Kaprice flugeti (R).

12) Duonsfera taso. — Rilata al speco de ciklono.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

SUBSTANTIVO, SUPLEMENTO DE ADVERBO

Tiu substantiva suplemento montriĝas sub du formoj :

Prepozitiva formo (Al, de, kun) : ni decidis la aferon favore al via peto ; dank'al tiu bela vetero la festo estas plej agrabla ; li vojaĝis laŭlonge kaj laŭlarge de tiu montara regiono ; esperanto estu studata paralele kun gepatra lingvo.

Akuzativa formo (post adverboj devenantaj de verba radiko).

— koncerne tiujn argumentojn, ili rifuzis ; ili estas blindaj rilate sin mem.




Malklereco


— Telefone vokinte nin, oni asertis al ni, ke iu, la tutan posttagmezon torturadis iun Bach ; ĉu vi aŭdis ion ?



Zorgema edzo

— Ŝparinte monon por malfacilaj momentoj, ĉu ni ne povus disponi iom da ĝi por mendi taksion ?





Bona organizado

— Tiamaniere ne nur ni povas dormi 5 minutojn plu, sed ĉiumatene, rapide vestante min, mi faras taŭgajn bonefikajn gimnastikajn movojn.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (3 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (430 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (4000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 393 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (25 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501 - CHICAGO, Illinois 60 657.

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 3-4 de 1978, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Très bientôt, Grésillon va s'ouvrir aux stages d'été. La participation sera vraisemblablement comparable à celle des années dernières. Les stagiaires trouveront encore quelques changements matériels qui, espérons-nous, leur plairont. Nous avons commencé à aménager les pièces des communs soit en salles de cours, soit en chambres.

Sur le plan matériel, l'essentiel de ce qui nous semblait devoir être fait est en très grande partie réalisé. Si nous regardons en arrière, les progrès sont grands et nous nous en réjouissons. Mais si nous regardons le programme des activités culturelles depuis vingt ans, les changements sont nettement moins spectaculaires. Il est temps de voir si, dans ce domaine, il n'est pas nécessaire de faire évoluer les choses. Le Bureau réfléchit sérieusement à ce problème. Il a commencé à poser des questions auxquelles il faudra trouver des réponses peut-être nouvelles :

Le calendrier des stages n'écarte-t-il pas ceux dont les vacances ne correspondent pas à la répartition des périodes à l'intérieur des congés scolaires ?

Est-il souhaitable que chaque série de cours soit impérativement incluse dans une période de trois semaines entre deux dates fixes ?

Ne serait-il pas nécessaire de bien faire comprendre que la session d'examens de l'Institut Français d'Esperanto qui se situe traditionnellement à la fin de chaque période de cours n'en est pas le couronnement, ce qui tendrait à faire croire que ces cours constituent une préparation suffisante à ces examens ?

Ne faudrait-il pas développer les tests « maison » destinés à aider les personnes qui suivent les cours à faire le point sur leur niveau de connaissance et de maniement de la langue ?

Est-il opportun de séparer les activités intellectuelles des activités manuelles ? Ces dernières ne sont-elles pas également aptes à faire progresser la connaissance et la pratique de la langue ?

D'autres questions peuvent se poser. Nous aimerions que les habitués de Grésillon et ceux qui aimeraient venir, nous fassent des suggestions. Des modifications des habitudes sont sans doute possibles, peut-être souhaitables. Certaines se heurteront à des impératifs de gestion. Mais il est bon, après 25 ans de fonctionnement, de voir si, dans le domaine des activités, il n'y a pas des améliorations à introduire.

P. BABIN.

Inter Ni

Kiam ni rigardas malantaŭen al la unuaj jaroj de la Kulturdomo kaj faras komparon kun la nuna tempo, ni konstatas plibonigon, ŝanĝojn al pli agrabla materia vivo. Sed ni ankaŭ konstatas kvazaŭ stagnadon de la kultura situacio. Ne multo ŝanĝiĝis sur tiu tereno dum 25 jaroj. Pro tio la estraro decidis fari demandojn al si mem, al la vizitintoj de la Domo kaj ankaŭ al tiuj, kiuj ŝatus veni sed... :

Ĉu la divido de la someraj programo en tri periodojn ne ĝenas kelkajn personojn ? Ĉu estus pli taŭge mallongigi aŭ eĉ malaperigi la « periodojn » ?

Ĉu estas oportune apartigi intelektajn kaj manajn aktivaĵojn ? Ĉu la lastaj ne ebligas riĉigon de la lingvokonoj kaj praktikon konkretan ?

Ni ŝatus ricevi eventualajn rimarkojn kaj sugeston pri tiuj problemoj. ĉar post 25-jara funkciado de la Domo la respondeculoj deziras eventuale plibonigi tiun aspekton de la vivo en Gresillon.

NOS PEINES

Le printemps nous a apporté en quelques semaines, deux nouvelles attristantes. Nos amis Marcel Granier, de Grenoble, et Marius Dessapt, de Thiers, nous ont quitté. Esperantistes convaincus, actifs et efficaces, amis de la Maison Culturelle dès sa fondation, ils ne laissent que des regrets.

Leurs familles voudront bien trouver ici toute notre sympathie.

LA REVUE

La plupart des abonnés se sont mis en règle pour l'année 1978. Nous conseillons à tous ceux qui ne l'ont pas encore fait de nous régler leur abonnement au plus vite. Merci.

ABONNEMENTS BIENFAITEURS 1977 (suite)

A. Rey (69)	30

ABONNEMENTS BIENFAITEURS 1978 (suite)

M. Bergerot (88)	60
M. Chamarier (69)	30
L. Lentaigne (34)	30
A. Rey (69)	30
R. Devendeville (59)	30
M. de Oriols (64)	30
G. Levêque (95)	30
G. Baudry (75)	30
G. Cau (13)	30
O. Meunier (45)	30
O. Garnier (44)	30
L. Bossuet (33)	30
J. Bailly (89)	30
H. Regard (45)	30
F. Lanz (75)	30
B. Kremlacekova (Tchéco.)	30
G. Musset (49)	30
G. Hébert (76)	50
Total :	**590**

Conseil d'administration du 2 Juillet 1978

La séance est ouverte à 10 heures par M. Babin, en présence de : Mme Cheverry, MM. Boyer, Ciret, Dairon, Guillaume, Métivier.

STAGES D'ETE 1978.

Ils s'annoncent comme prévus dès la réunion du bureau du 30 avril. Les 3 stages seront relativement équilibrés. Quelques inscriptions du 1er ont été décommandées tardivement au profit du 2e stage. Une moyenne de 80 participants pour les 2 premiers stages est déjà prévisible. Les inscriptions continuent à arriver pour le 3e stage.

Première période. — Administration, M. et Mme Babin. Des conférences aux thèmes très variés sont prévues. Il pourra y avoir des cours si des stagiaires en font la demande. Mmes Bourot et Vincent pourront les assurer.

Deuxième période. — Administration, M. et Mme Dairon. Mme Chids-Mee, qui devait assurer le 1er degré sera indisponible et remplacée par Mme Vincent (cours par la méthode directe). M. Lloncy conduira le 2e degré. M. Ribot, en convalescence, se fera seconder par M. Mollison pour assurer le 3e degré.

Troisième période. — Administration, M. et Mme Guillot. Le 1er degré sera conduit par M. Parizot. Le 2e degré par Henri Boyer. Le 3e degré par M. Boyer. Aux trois stages auront lieu les activités manuelles habituelles et des excursions organisées en fonction du nombre de participants.

Du 3 au 12 septembre est prévu un stage du mouvement espérantiste JEAN. M. Bénistant fera un cours. M. Babin pourra apporter une aide intermittente selon les besoins.

Tout le personnel est au complet pour les différents stages. Il y a eu quelques difficultés durant le mois de juin pour remettre en ordre le château avant les stages, en particulier là où des travaux tardifs ont été effectués par les ouvriers, ainsi qu'après les brefs séjours et passages.

POUR 1979.

Vacances de printemps. — Conformément aux nouvelles dispositions concernant les vacances, il est prévu une rencontre d'enfants du 13 au 18 avril. Le contenu sera identique à celui de cette année. L'administration sera assurée par M. et Mme Dominique Babin.

Pour l'été. — Le même découpage sera conservé. Le système adopté depuis deux ans (conférences au 1er stage) avait l'avantage de mieux équilibrer les stages au point de vue nombre de participants. A la 2e période, les stagiaires viennent surtout pour suivre des cours. L'intendance sera assurée par M. et Mme Babin au 1er stage, par M. et Mme Vilhelm au 2e stage, par M. et Mme Mathé au 3e stage.

Il semble qu'un certain nombre de participants ne puisse pas suivre le stage complet de 3 semaines. Le bureau a étudié le problème et envisage d'organiser des stages moins longs, afin de satisfaire les participants non-enseignants dont les congés sont plus courts.

Certains participants non-francophones ont fait remarquer qu'ils ne pouvaient pas suivre les activités manuelles dont les explications sont données en langue française. Il est souhaitable qu'un effort soit fait pour tendre vers l'utilisation de l'Esperanto dans les activités de loisir, afin que les cours et les activités manuelles fassent un tout permettant d'apprendre et d'approfondir l'utilisation de la langue universelle.

Pour 1980. — I.C.E.M.-Esperanto propose un stage début juillet, mais ne peut assurer l'occupation complète du château. Il y aura donc des participants extérieurs à ce mouvement, mais toutes les activités I.C.E.M. leur seront ouvertes.

QUESTIONS DIVERSES.

Le prix d'achat des livres est en continuelle augmentation et il n'est plus possible d'établir des tarifs de vente. Bien souvent, il y a une augmentation entre la commande et la livraison.

En octobre, il faudra prévoir une augmentation du prix de pension, en fonction des modifications de tarifs des denrées alimentaires, en particulier .

TRAVAUX.

Comme prévu, un rétroprojecteur a été acquis, et pourra être utilisé dans différents domaines (cours et activités diverses). La nouvelle machine à laver le linge est en fonction depuis quelques jours et donne toutes satisfactions actuellement. Les présents remercient M. Métivier qui a, encore une fois, assuré la décoration florale devant et autour du château.

Deux salles extérieures ont été aménagées dans les communs. Le compteur d'eau courante du secteur public a été posé à l'entrée de la propriété. Un devis est en cours pour faire un branchement sur le réseau intérieur afin d'assurer une alimentation de secours en cas de défection de la pompe. Quelques sommiers et matelas sont en cours de livraison. Dans les chambres des communs, des bidets ont été installés, ainsi que les arrivées des tuyauteries pour l'eau chaude qui sera amenée plus tard.

L'ordre du jour étant épuisé, la séance est levée à 12 h. 30.

Le secrétaire de séance :
Guy DAIRON.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon : noir :	0,60 F.
couleur :	0,80 F.
Cuillères de collection :	13,00 F.
Pendentifs :	12,00 F.
Disques de stationnement :	4,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	2,00 F.

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Bobin

Prix : **18,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

ALBERTO FERNANDEZ

SENĜENAJ DIALOGOJ

Popularscienca esploro de Fundamentaj demandoj